PRI GRACO

Graz (Graco) estas la dua plej granda urbo de Aŭstrio. Ĉi situas meze de Eŭropo kaj estas loko kun historio, spirito kaj bongusto. Kreskinta tra jarcentoj, Graz estas hodiaŭ moderna scienca urbo kun 8 universitatoj kaj fakaj altlernejoj kaj kun vigla kreema medio. Mediteranea vivosento, bona atingebleco kaj kultura heredaĵo, kiu senteblas en ĉiu angulo – jen kio tiel speciale karakterizas la urbon.

ALVETURADO

Graz estas elstare bone atingebla: per aŭto laŭ aŭtošoseoj A2 aŭ A9, per trajno (ekz. ÖBB), buso (ekz. FlixBus) aŭ aviadile. La flughaveno de Graz situas nur 10 km for de la centro kaj estas bone ligita al ĝi per buso, fervojo, taksio. Ankaŭ de la flughaveno Vieno veturadas rekta trajno dum ĉ. tri horoj al Graz – komforte tute sen trajn-ŝanĝo. Tute nova fervoja linio kun tunelo sub la montaro Koralpo interligas la urbon Klagenfurt (ĉefurbo de Karintio) kun Graz en veturtempo de malpli ol unu horo.

REGION GRAZ
www.regiongraz.at

LISTO DE PERANTOJ

Ĉu vi trovas malfacilecon mem aliĝi kaj pagi al la 111-a UK? UEA disponas je listo de perantoj, kiuj povas helpi vin en diversaj mondopartoj. Vidu la liston: uea.org/alighoj/perantoj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

ESPERANTO SOCIETO STIRIO

Ĉi tiu produkto estas fabrikita laŭ la gvidlinioj de la aŭstria etikedo pri medio UZ-24, UWZ 900 sur PEFC-atestita papero kun puraj vegetaĵaj farboj kaj uzante presplatojn liberajn de kemiaĵoj kun 100% da sun-energio.

PEFC
PEFC/06-39-04

UMWELTZEICHEN

Pres-indikajoj: Respondecas pri enhavo: Graz Tourismus und Stadtmarketing GmbH. Grafikaĵoj: Graz Tourismus und Stadtmarketing GmbH. Fotoj: Graz Tourismus – Tom Lamm, Werner Krug, Harry Schiffer, Mias Photoart, Paul Stajan. UMJ - N. Lackner. Lipizzanerheimat – Die Abbilderei. Region Graz – Mias Photoart, Tom Lamm, pixelmaker.at. El Gaucho – Werner Krug. Presado: Presejo Klampfer. Ĉiuj informoj estas rezerve de komposteraroj kaj preseraroj. Kopirajto: Graz Tourismus 2025

GRAZ AŬSTRIO

111-a Universala Kongreso de Esperanto

1-8 de aŭgusto 2026

Unua Bulteno



111-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
GRAZ
1.–8.8.2026

KONGRESA TEMO:
VOLONTULADO EN LA SERVO AL DAŬRIPOVA EVOLUIGO

VIDINDAĴOJ

En Graz renkontiĝas ĉiupaŝe historio kaj nuntempo – kaj igas la urbon loko plena de ekscitaj kontrastoj. Super ĉio tronas la horloĝturo – videbla de malproksime, kiel elstara signo sur la kastelmonto. En la urbo mem impresas arĥitekturaj majstroverkoj kiel la duobla helik-ŝtuparo aŭ la baroka kastelo Eggenberg. Kontraste al ili staras modernaj ikonoj kiel la Domo de Belartoj kaj la insulo en rivero Mur – estiĝintaj en la jaro 2003, kiam Graz estis la kultura ĉefurbo de Eŭropo.

MONDA KULTURA HEREDAĴO DE UNESKO

La historia malnova urbo de Graz (Graco) ekde 1999 apartenas al la monda kultura heredaĵo de UNESKO, la kastelo Eggenberg aldoniĝis en 2010. En apenaŭ iu alia urbo de Eŭropo troviĝas sur tiel malvasta areo arĥitekturo el preskaŭ ĉiuj epokoj – ekde la mezepoko ĝis la nuntempo. Kiu promenas tra la angulplenaj stratetoj, entreprenas vojaĝon tra la eraoj – akompanate de la horloĝturo, la silenta sentinelo super la tegmentoj de la urbo.

ĈEFURBO DE FRANDAĴOJ

De 2008 Graz estas oficiale la „Ĉefurbo de frandaĵoj de Aŭstrio“. Regioneco kaj sezoneco difinas la kuirarton. Ĉu kamparanaj bazaroj kun freŝaj produktoj, hejmecaj gastejoj, elegantaj restoracioj aŭ trufaj manĝaĵoj en aŭtuno – en Graz oni festas la bonguston.

ALLOGA ĈIRKAŬAĴO

Ĉirkaŭ Graz malfermiĝas pejzaĝo de travivaĵoj plena je eblecoj: la ĉevalbredejo Piber, hejmloko de la tutmonde famaj lipicaj ĉevaloj, pentrindaj vinberaj kulturejoj kun „branĉet-faskaj elverŝejoj“ (t.e. kamparstilaj gastejoj), fortikaĵoj, kasteloj kaj idiliaj migrad-vojoj. Itineroj por biciklistoj kaj ĝuantoj de frandaĵoj gvidas tra la milda pejzaĝo de Stirio. Varmbanejoj, lagoj, grimprokoj kaj rajdeblecoj ofertas variaĵojn por aktivuloj – en distanco de nur malmultaj minutoj for de la urbo.